EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 35>** ● Eo-Tago ● Noireau ● Arbe ● UK temo ● Ĉinio **< junio 26**

# Afiŝoj je dispono por la Esperanto-Tago

Tiu tago estas ege uzebla por konigi vaste nian lingvon. Ĝi okazas ĉiujare en la 26a de julio, kiam aperis en 1887 la Unua Libro, kiu prezentis la lingvon al la mondo.

La laborgrupo de UEA pri informado, ZPI, ĉiujare aktivas por krei afiŝojn. Kutime ili aperigas nur unu ĉi-jare ili proponas du, por ke en la unuopaj landoj oni havu elekton. Ni prezentas ilin ĉi tie. Jam disiris invito traduki la tekstojn nacilingven, kaj revenis jam multaj respondoj. Kiam konate, mi aldonos la lokon en la retejo de UEA. Kie troviĝas la ricevitajn tradukojn troveblas, kune kun listo de la lingvoj ankoraŭ mankantaj.




Evidente, la realeco de milito ene de la limoj de Eŭropo enfokusigas la atenton al la vivgrava diferenco inter milito kaj paco, kune kun la klara ligo kun lingvo-elekto.




**Esperanto-Tago 2022**
**Julio 26**
**Ni konigu nin per tio**

Diskoniginda plie estas la adreso en la retejo de UEA, de kie eblas el;ŝuti la afiŝojn en almenaŭ du kvalitoj. Unu por reta uzo, la alia por preskvalito. Intertempe, mi alkroĉos la afiŝojn en reta kvalito, kune kun la tria parto de la rezultoj el AMO 86.

## ILEI aprezas franc-afrikan kunlaboron




Gratulon al Françoise, kaj al UEC (do ĉefe Prof. Elisee Byelongo Isheloke) pro la kurso: bonega novaĵo!

Informo tra Christian Laverenne

------------

En la kadro de malgranda ceremonio en *Zoom*, ĉi-matene estis transdonita, en la ĉeesto de kelkaj lernantoj, tiu ĉi atesto al Francoise Noireau, el Francujo.

Informo tra Renato Corsetti

## ILEI aktiva en Mongolio

Nun estas du kursoj.
- Reta kurso kun 150 aliĝintoj
- Ĉeesta kurso kun 5 aliĝintoj. Semajne unu fojon okazas la kurso

Tserendejid, Sekciestro de ILEI en Mongolio

## Landa Parad' – Afriko kaj Ameriko anoncitaj

La serio <Landa Parad'> ege progresis. Nun en la retejo <aktivulo.net> la prezentaĵoj por Afriko kaj Latin-Ameriko estas ĝisdatigitaj el 2021 ĝis majo 2022. Restas nur Azio, kiu estos aktualigita nur en mia aŭtuno, kiam ni scios la konsiston de la nova Komitato de UEA, kaj eble la konsiston de kelkaj komisionoj. En tiu sezono, mi devos aktualigi ĉiujn el la aliaj raportoj. <Landa Parad'> plenumas la rolon de la siatempa Jarlibro de UEA, almenaŭ rilate al la Landa Agado, pri kiu mi respondecas komisie de la estraro.

smg.







### ESF daŭre aktivas

Humphrey Tonkin: [Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio, kaj Neregistaraj Organizoj – nemalhavebla kunlaboro](https://esfconnected.org/2022/06/20/nemalhavebla-kunlaboro/)
https://esfconnected.org/2022/06/20/nemalhavebla-kunlaboro/

## Saĥarov laŭ la sezonoj

En la virtuala biblioteko de “Sezonoj” hodiaŭ aperis la bitlibro ‘Superforta ambicio’, verkita en 1913 de la Ruslanda esperantisto Aleksandr Saĥarov. Ĉi tiu primovada satiro nun estas libere elŝutebla kaj legebla. Legu ĉe ‘La Ondo de Esperanto’

https://sezonoj.ru/2022/06/sezonoj-2/

## Madagaskaro regule kaj radie

La ELSENDO N°121 de Aminda Radio Esperanto disponeblas nun ankaŭ vi povas sekvi artikolon pri la malagasa funebra arto «Aloalo » el la suda regiono de Malagasio. Rekta raportaĵo pri la Ŝtuparo de Ambondrona estas proponita al vi por bone konatiĝi kun la urbocentro de Antananarivo. Krome, Vinilkosmo ebligas al ni kunĝui la novan kanton «Intergalaksia» de Vojaĝo. Vi povas sekvi ankaŭ kelkajn novaĵojn pri la lando kaj lecioneto pri la malagasa lingvo koncernas la faman «taxi-brousse» por tiuj, kiuj ŝatas turismi. Agrablan aŭskultadon al vi ĉiu!

https://youtu.be/49DjRKpQMUw

## AVE por la avenuo



Tutmonda Arbo-Plantado (TAP) estas kampanjo de UEA komenciĝinta fine de 2020 kun la celo plantigi minimume 1000 arbojn ĝis 2030 en ĉiuj kontinentoj. TAP ekis okaze de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest’ 2020) kaj ĝia celo ligiĝas al la Tagordo 2030 de UN rilate la 17 Celojn por Daŭripova Evoluigo. Pri TAP aperis artikoloj en la revuo *Esperanto*, oficiala partnero de la kampanjo, kaj raporto pri la unua jaro 2021: https://uea.org/l/teko/komitataj/Tutmonda_Arbo-Plantado_Raporto_2021.pdf.

En 2021 jam ĉ. 700 arboj estis plantitaj de esperantistoj kaj amikoj kadre de TAP. Pri la kampanjo okazis interŝanĝoj kun aktivuloj de ILEI, AVE, la Esperanto-urbo Herzberg am Harz kaj esperantistoj tutmonde. En 2022 TAP havas la celon daŭre kunlabori kun individuoj, sed ankaŭ kun grupoj, kiuj potencialigas la atingojn de la kampanjo. Se vi mem plantis arbojn, sciigu la organizantojn de la kampanjo (detalojn ĉe la raporto). Se vi povas donaci por plantigi arbojn, viaj donacoj bonvenas al la Fondaĵo Klimato: uea.org/alighoj/donacoj/co2.

Urĝas donacoj por ke oni profitu la plantad-sezonon, kiu jam komenciĝis. En 2022 unu el la fokusoj de TAP estas la kunlaboro kun la Asocio de Terkultivistoj Esperantistaj (ATE), kiu plantigos fruktarbojn en Benino. Donacoj al la Fondaĵo Klimato de inter 328 kaj 550 EUR ebligos plantadon de tuta hektaro en la lando. Laŭplane oni plantos anakardiujojn (akaĵuarbojn), avokadujojn, oranĝujojn kaj palmarbojn kaj la plantitaj hektaroj nomiĝos Esperanto-bienetoj. Lokanoj estas enplektitaj en la plantado. Ĉar temas pri fruktarboj, la plantitaj hektaroj havos ankaŭ ekonomian gravecon, donante aldonan valoron al la signifo de Esperanto por la loka komunumo.

Aldone al la kunlaboro kun ATE, daŭre estos kunlaboro kun la Centro por Interpretado de la Naturo (Kanado), la Internacia Esperanto-Arbaro (Ĉinio) kaj la

Arbara Servo de la Departemento de Agrikulturo (Usono). UEA kontaktos neesperantistajn organizojn kiel la germana *Atmosfair* kaj la brazila SOS *Mata Atlântica* por kunlaboroj.

### Instruu en Métabref

La informo aperis en EKO 34, sub la nomo 'Mirejo', sed ŝi atentigis, ke la tekston verkis s-ino Anne-Marie Ferrier.

## Alvoko por riĉigi la programon de la UK

Al la engaĝitoj pri la kongresa temo kaj subtenantoj:

Aperis eblo aranĝi la partoprenon de du indiĝenaj aktivuloj el Brazilo. Mi kunlaboras pri tio kun la vicprezidanto de UEA Fernando Maia kaj la ĝenerala direktoro Martin Schaeffer. Jam aranĝitaj estas aliĝkotizoj kaj subteno por la vizopeto (financa kaj invitletera). UEA pretas ankaŭ pagi unu flugbileton. Restas trovi la monon por kovri la alian. Se vi pretas donaci ion por tiu celo, bv. pagi al la fondaĵo 'Partoprenu UKon', https://uea.org/alighoj/donacoj/partoprenu_uk, indikante ĉe 'Notoj, komentoj': 'Por Gomes da Costa kaj Machado de Oliveira'. Eĉ malgrandaj donacoj povos helpi.

Mark Fettes

## Recitado de poemoj en Liaoning

Kunlabore kun UEA kaj ĝia komisiono de Belartaj Konkursoj (BK) la 2-a Liaoning-Recitado de Esperantaj Poemoj preparata de Liaoning-a Esperanto-Kultura Klubo (LEKK) por la Esperanto-Tago (la 135-a datreveno de Esperanto) okazos en la 30-a de julio, 2022, en Shenyang, ĉefurbo de la provinco Liaoning, Ĉinio.
Ni entute elektis 10 poemojn de la verkistoj István Ertl, Neide Barros Reĝo, Jean-Maries Ries, Mao Zifu, Jesper Lykke Jacobsem, Aleksandro Mitin, Nicola Ruggiero, Tatjana Auderskaja, Serĝo Sir kaj Tiberio Madana, premiitajn en BK, kaj tradukis ilin en la ĉinan lingvon. Kontaktu nin kiel eble plej rapide, se iuj verkistoj legos tiun ĉi bultenon. Ni atendos la respondon kun via nuna nacieco ĝis **la 30-a de junio, 2022**.

Se oni volas esprimi gratulojn aŭ bondezirojn al la recitado, ni atendas tiajn mesaĝojn ĝis la 3-a de julio, 2022. Ni kredas, ke la recitado estos mirinde ĉeesta Esperanto-aktivado en 2022.

========= vortoj: 1070 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.